

KOLOKVO DUM LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

La lundon 26-an de septembro, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, lanĉita de la Konsilio de Eŭropo, estis organizita en la sidejo kolokvo pri «La lingva situacio en la eŭropaj institucioj post la 'Briteliro'». La enkondukintoj en la kolokvo estis: José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF, Ricardo Albert Reyna, profesoro de la Aŭtonoma Universitato de Madrido kaj tradukisto kaj Manuel Pancorbo Castro, profesoro de la UNED kaj direktoro de Fundación Esperanto. Poste malfermiĝis debato inter la ĉeestantoj.

Ĉeestis ĉ. 15 homoj, ĉiuj esperantistoj.

Ni planas kunvoki novajn kolokvojn dum la venontaj monatoj, se eble unu kolokvon ĉiun monaton. La sekva okazos la 24-an de oktobro, kaj la proponata temo estos: “Novaĵoj ĉe UEA, diskuto pri la propono de nova statuto, kaj aliaj aferoj”. Aliaj temproponoj estas bonvenaj.

DON QUIJOTE DE LA MANCHA LEGOTA DE BLINDULOJ

La 4-an de oktobro en la sidejo de la Biblioteca Nacional okazos interesa aranĝo rilate la datrevenon ĉijaran de la forpaso de Cervantes en 1616. Oni petis al nia samideano Pedro Zurita, ke li kunlaboru kolektante la legadon de la komenco de Don Quijote fare de blinduloj de pluraj landoj en ilia denaska lingvo. Li sukcesis ke blinda sinjorino el Serbio legos la komencon de Don Quijote esperante en la traduko de Fernando de Diego, kaj li kontaktis ankaŭ kun aliaj homoj kiuj legos en aliaj lingvoj, inter kiuj: franca, angla, portugala, germana, rumana, pola, rusa, araba, japana kaj ĉina.

La legado aŭ la monro de la koncernaj filmoj okazos je la 12a matene, kaj la ĉeesto estas malferma. La projekto estas anoncata en la retejo de la Nacia Biblioteko:

http://www.bne.es/es/Actividades/2016/10-octubre/Lectura_braille_Quijote.html.

DISKO “ESPERANTO” BALDAŬ PREZENTOTA EN MADRIDO

Notu jam la daton de la 5-a de novembro, ĉar tiam oni prezentos en muzikejo “Moby Dick” de Madrido, diskon de la rokbando Cronómetrobudú, nomatan ĝuste “Esperanto”. Okazis prezentoj jam en Meksikio, kaj la 1-an de oktobro en Burgoso, de kie devenas la bando, sed tiu estos la unua en nia ĉefurbo.

Krom la titolon, la disko enhavas erojn en la internacia lingvo, inter kiuj la plej elstara estas la partopreno de Miguel Fernández en unu el la pecoj, per la deklamado de “Ho, mia kor”. Por la premieroj en Burgoso kaj Madrido la bando invitis Miguel Fernández kaj la esperantistojn interesitajn. Pliajn detalojn ni rememorigos en venonta eldono de nia bulteno.

ALIAJ OKTOBRAJ RENKONTIĜOJ

La 24-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazas ekde la 1-a ĝis la 9-a de oktobro en urbo Cambrils (provinco Taragono, Katalunio).

Ekstera asocio por *pliaĝuloj* (emeritoj kaj ĝenerale homoj super 50 jaroj) organizas inter la 14-a kaj 22-a de oktobro eventon en Almerio (orienta urbo de Andaluzio, ĉe la Mediteraneo), en kiu oni inkludos Esperanton kiel unu el la eroj de la distra programo. La Festivalo estos eminenta distra kaj turisma, kun serio da aktivaĵoj sportaj kaj kulturaj, inter kiuj oni organizos rapidan kurson de Esperanto, kun konkurso ĉe la fino, kiujn gvidos la de madridanoj konata aktivulo Dennis Keefe. Por pliaj detaloj, kaj por ĝui specialan rabaton por esperantistoj, vizitu la retejon de HEF: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/320-festivalo-seniors-almerio>.

Tuj poste, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo organizas la 20-an Andaluzan Kongreson, kiu okazos de la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro en la urbo Antekero. Vidu detalojn en la paĝaro: <https://andaluciaesperanto.wordpress.com/>.

VIZITIS NIN

Benoît Ente, samideano el Francio, vizitis la sidejon komence de septembro, post sia partopreno en seminario de la dominikana ordeno en Salamanko.

La 25-an de septembro okazis rendevuo en la parko de Retiro, por adiaŭi peruan samideanon Héctor, kiu pasigis kelkajn semajnojn en Madrido, kaj revenas al Peruo.



NOVA KURSO EN LA SIDEJO

Kiel ni anoncis, la kurso de Esperanto en la madrida sidejo komenciĝis denove la 17an de septembro. Kiel kutime, ĝi disvolviĝas la sabatojn matene, en du niveloj. De la 11:00 ĝis la 12:00 por la baza nivelo kaj de la 12:00 ĝis la 13:00 por la supera (progresanta) nivelo.

Ankoraŭ eblas aliĝi kaj ĉeesti. Por tio, skribu mesaĝon al la instruisto, Juan del Castillo, ĉe la adreso juandelcastillomartinez@gmail.com aŭ al la adreso de MEL: madrid@esperanto.es.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Notu ke por la 24-a de oktobro estos kunvokita nova kolokvo/debato (vidu supre); detalojn ni sendos en aparta kunvoko.

La kutima sabata babilado ankoraŭ ne estis kunvokita por tiu ĉi monato, sed plej probable okazos la 8-an de oktobro. Atentu forumojn kaj sociajn retojn por koni la detalojn.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al nivocho@gmail.com

